


# LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO  
POR LA

JUNULARO KAJ  
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:  
West-Grafdijk (N.H.)  
Nederlando.  
Ĝironumero 209354 Nederlando.

Jarabono:  
Nederlando: 0.80 guldeno  
Eksterlande: 11 fr.fr.; 0.70 dol;  
2.1 sv. fr.

## LA ĤOLERO.

Sekvantmatene jam la tuta vilaĝo scias, ke regas la ĥolero. Kaj en la homoj io ŝanĝiĝas. Ili fariĝas suspektemaj kaj silentaj; ŝajnas, ke la hinda gajemo dum mallonga tempo estas forpelita. Inter kolegoj kaj samklubanoj la interparoladoj ne glate iras. Ĉiu rapidas kiel eble plej baldaŭ hejmen por vidi, por aŭdi — jes, kion? Ho ve, la homoj preskaŭ ne kuraĝas konfesi al si mem, ke ili hezitas eniri sian propran korton, kie dum ilia foresto, kvankam eble mallonga, la malsano povas esti veninta. Kaj estas homoj, kiuj eĉ de temp' al tempo timeme returnen rigardas, kvazaŭ ili sin sentas sekvataj de nevidebla malamiko, kiu surprize volas ataki ilin.

Kontraŭe al tiuj estas la aliaj, kiuj asertas, ke ili tute ne timas. „Ĥoleron! Mi ridas pri la ĥolero! Vi kun ĉiuj viaj antaŭ-zorgoj! Ne, ĝuste pro via troa timemo vi allogas la malsanon!”

Eble kaŝas sin iom da vero en la diro de tiuj mokemuloj. Sed kiel estu, ilia nombro ĉiam malpliĝas.

Vespere la familioj sidas en la antaŭgalerioj. La infanoj ludas, sed malpli brue ol kutime, dum la pli aĝaj disfaldas la ĵusricevitan gazeton, tuj serĉante la nuran rubrikon.

„Anoncite tiom da kazoj, el kiuj tiom da mortoj.”

„Estas kvar pli ol hieraŭ,” diras iu. Kaj alia: „Ĉiutage plinombrigi la kazoj.” Post tio silentiĝas. Ne mirige: la ĥolerofantomo vagas ĉirkaŭ la domo. Ĝi ŝteliras preter muroj kaj arboj; glitas, kiel ombro, trans la lunlumigita herbokampo, kies senmovaj trunketoj estas bone videblaj; glitas neaŭdeble laŭ la barilo por sekvi nesuspektaman pasanton, kiu ankoraŭ — nun — kun fiera kapo iras sian vojon.

La varmeta noktvento, saturita per laodoro de rozoj kaj aliaj floroj, alportas ĥoleron; la ondetoj de l' rivero, kiuj gaje intersaltas — ĥoleron; roskovritaj fruktoj, ĵus deŝiritaj, — tente allogantaj — ĥoleron. Aŭdu, en la malproksimo ektintas la gamelan-orkestro. Sed sur la malgranda korto de tiu, kiu ĝin ludigas, regas funebro anstataŭ ĝojo. Dudekope la viroj kaŭras kune kaj diras siajn preĝojn. La sono de l' voĉoj ondadas al kaj reen — jen mallaŭte, jen pli forte. Kelkfoje estas kiel petego, poste ŝvelanta ĝis esprimo de l' plej pasia konvinko. „Alaho, la plej granda; neniu dio krom Alaho!”

Ankaŭ la Eŭropeanoj ĝin aŭdas, kaj..... scias la signifon. Ili rigardas unu la alian, sed diras nenion. En tiaj momentoj la homoj ankaŭ senvorte sin komprenas. Kaj dum ili ankoraŭ aŭskultas la tonojn, kiujn la vento alportas, malgranda, malgaja procesio venas sur la vojo: bambua portilo, kovrita per sarongtukoj, kaj antaŭiras ĝin preĝanta pastro. Ĝi ne iras eksterordinare malrapide, nek eksterordinare solene; multajn oni ja tiel forportas en ĉiu tago. Sed en la granda, blanka domo la infanoj ĉesas sian ludon kaj eble..... demandas iu etulo, kiu ankoraŭ malmulte komprenas pri la strangaj okazaĵoj, kio ĝi estas, tio kio preteriras. Kaj eble li demandas tri, kvarfoje, pro tio, ke li ricevas eviteman respondon, kiu ne kontentigas lin.

Kaj alifoje: estas meze en la tago. La patrino estas okupita pri la kudraĵo, pri la servistoj, aŭ pri la etulino, kiu riskas la unuajn paŝojn inter ŝi kaj la vartistino. Dum tempeto malaperas la penso pri minacanta danĝero. La pli grandaj infanoj — ili ja havas libertempon — amuzas sin en la ĝardeno. Sed subite ili enkuras la domon kaj rapide kuntiras ŝin.

„O, panjo, rapidu! Tuj venu! Oni enterigas riĉan ĉinon!”

Antaŭ la ĉerko oni portas kvadratajn bretojn kun manĝaĵoj kaj trinkaĵoj. Malrapide, kaj ho, tiel singarde pro la multekostaj porcelanaj vazoj, pladoj kaj tasoj, en kiuj estas delikataj legomoj, kuirita rizo, ovoj, fruktoj kaj ĉiuspecaj bakaĵoj. Sekvas grandegaj pladoj kun rostita viando, tuta porko, anasoj, anseroj, kokinoj kaj kolomboj. Ĉio ĉi estas ofero al la animo de l' mortinto, kiu nevideble ĉirkaŭŝvebas la ĉerkon.

Tamen la plej forta allogilo por la infanoj estas la multaj naturgrandaj pupoj, kiuj formas parton de la procesio. Ili estas kovritaj per multkoloraj vestoj, brilantaj pro oro kaj arĝento. La infanoj volas nombri ilin, erariĝas pro la varieco de l' koloroj kaj

ridante ili ĉesas siajn klopodojn. „Ĉu ni povas sekvi ilin, panjo? Ĉu ni povas sekvi?”

Sed la patrino kapskuas nee, kaj retenas la petolemajn gebubojn.

„Denove unu for pro la ĥolero,” ŝi pensas kaj timtremante: „Kiam venos la vico al ni?”

Trad: VANE.

### DANCKANTETO. (ĉenkanto por 4 voĉoj).

①                      ②                      ③                      ④

*1=F* 5 . 4 | 3 . 2 | 1 <sup>7</sup> 1 2 | 3 . 4 |

Ve - nu, ni sal - te - tu kaj dan - cu,

5 . 4 | 3 . 2 | 1 <sup>7</sup> 1 2 | 1 . . ||

Ve - nu, ĝo - jaj es - tu ni.

Antverpeno (Belg)

trad. J. v. SCHOOR.

### SKOTA HISTORIO.

En Edinburgo oni malpliigis la tram-tarifon de dek pencoj al kvin pencoj. La malpliigo tute ne kontentigis la loĝantaron.

„Antaŭe”, diris la edinburganoj, „piedpromenante ni ŝparis dek pencojn, kaj nun nur kvin pencojn!”

„NIA GAZETO”.

### LUDO (Paroladi).

Ĉiu ricevas samforman kaj samkoloran papereton. Per krajono oni skribu sur tiun paperon temon de parolado. Poste oni faldas ĉiujn foliojn laŭ sama maniero kaj la gvidanto kolektas kaj bone intermiksas ilin en iu ujo (ekz. ĉapelo). Laŭvice nun ĉiu devas preni unu „loton”, kaj paroladi pri ĝia temo, tuj aŭ poste, dum ekz. 5 minutoj (tio dependas de la kapableco de la ludantoj).

Buinen (Ned.)

M. MEDEMA.

### PLENDO KAJ RESPONDO.

La poeto venis antaŭ Dion  
Kaj plendegis:

„Aŭdu mian peton  
Kaj ne malpreferu la poeton.  
Al mi donis vi la fantazion,  
Kaj uzante ĝiajn sorĉajn fontojn  
Verkis mi poemojn kaj rakontojn.  
Bone ili — dank' al vi — sukcesis.  
Do ĝojigi povas mi la homojn,  
Arton enportante en la domojn.

Sed el fantazio kaj beleco  
Same arton krei vi permesis.  
Al artistoj de alia speco.  
La pentristo plaĉas per koloroj,  
La skulptisto per plastik-trezoroj  
Kaj la komponisto per la dono:  
De ĉiele melodiaj sonoj.

Kaj, ho ve, se oni nun komparas,  
Kion mi kaj kion ili faras,  
Kaptas min doloro kaj envio:  
Ilin en la tuta mond' nenio  
Baras, ravi korojn kaj animojn.  
Sed mi trovas ĉie lingvo-limojn.  
Mil milionoj ne komprenas miajn  
Vortojn eĉ plej arde poeziajn.”

Ridis Dio:

„Diris vi la veron.  
Bedaŭrinde tiun ĉi aferon  
Povas ŝanĝi, kara versfaranto,  
Ni ne tiel tuj per unu fojo.  
Sed la helpo estas sur la vojo.  
Ĉu ne aŭdis vi pri *Esperanto*?

Jes, dediĉu vin al ĝia servo,  
Propagandu ĝin kun ĉiu vervo,  
Helpu mem, forigi tiun mankon!  
En la tuta mond' vi trovos dankon!”

Berlino (Germ.)

KAREL VANSELOW.

## LA AMERIKA VEKHORLOĜO.

Strange, ke mi neniam al vi rakontis pri la amerika vekhorloĝo de mia amerika amiko Carli. Sed pli bone malfrue ol neniam.

Foje mi devis frue el la lito pro iu boatekskurso. Sed frue ellitiĝi ne estas facile al mi, kaj ĉar neniu el ni hejme faras tion, ni ne posedas vekhorloĝon.

Kion fari? Mi demandis al miaj amikoj kaj jen, Carli havis vekhorloĝon.

„Amerikan vekhorloĝon,” li deklaris kun fiero. „Vekilo, kiu eĉ surdegulon forpelas el la lito. Aŭdu, kiom da bruo.”

La maŝino eksonoris, kaj vere, ekestis neniam aŭdita bruego, raŭka alarmsignalo.

„Jen amerikaĵo, ĉu vi komprenas — bonega amerikaĵo — tion vi ne havas, vi holandanoj.”

„Ĉu estas ĉio?” mi malŝate diris, ofendite.

„Ĉio?” li ekscitiĝis. „Atentu, bubeto. Atentu. Nun ĝi malstreĉiĝis, vi opinias, ĉu? — sed post dek minutoj ĝi ree komencas — kun pli forta bruo — atentu.”

Apenaŭ li finparolis, kiam la horloĝo ree eksplodis, pli laŭte, pli brue, pli impertinente.

„Se vi do ekdormos post la unua signalo, la dua ree vekos vin — kaj poste la tria — kaj tiel plu.”

„Belege,” mi ĝojkriis — „donu al mi.”

Kaj mi kuris hejmen kun la amerika eltrovo, kaj metis ĝin malfade singarde, kiel la holandanoj ja agas, ankoraŭ aparte sur profundan teleron por plifortigi la sonon.

Matene je la kvina la horloĝo ekbruis sian alarmsonoradon. Tio ne similis la ordinaran sonoradon de niaj holandaj vekiloj, sed preskaŭ la kraketadon de maŝinpafilo. Pala mi vekiĝis subite, kaj saltante el la lito, mi preskaŭ ne sentis miajn piedojn pro konsterniĝo.

La horloĝo gaje dancis diablan dancon sur la profunda telero. Miaj haroj hirtiĝis. Kun malplena stomako aŭskulti tian spektaklon, estas tro multe por holandaj nervoj. Miaj manoj tremante kaptis la inferan maŝinon por funkciigi la haltigilon. Sed, ĉu la dormemo kulpis, ĉu la timo? Mi ne plu komprenis la meĥanisman kaj la vekilo daŭre tondris. En la aliaj ĉambroj, de la fratinoj, fratoj, gepatroj, mi aŭdis iajn sonojn, mallaŭtajn timkriojn kaj rapidajn paŝojn.

Kun timego mi ree ekprenis la vekilon, ĵetis ĝin sub la litkovriilojn kaj tiel klopodis sufoki la bruegon.

Tiam mia patro envenis en ĉambrorobo kaj kun la domĉapeto sur la griza kapo.

„Kion vi faras ĉi tie?” li severe demandis.

„La vekilo funkcias,” mi simple klarigis.

„La vekilo — mi supozis, ke vi frakasas la lavujojn — tian teruran bruegon mi ankoraŭ neniam aŭdis.”

„Ĝi estas la amerika —”

La vekhorloĝo silentis, malstreĉiĝinte.

„Feliĉe,” diris la patro. „Kaj tiun objekton neniam ree portu en nian domon. Via patro, kiu laboras la tutan tagon por vivteni vin ĉiujn, deziras nokte ripozon; kaj ankaŭ via patrino, kiu ĝis malfrue en la nokto flikas la ŝtrumpojn, bezonas ripozon; ĉu vi komprenas?”

La patro estis for. Mi tremis pro tiu severa riproĉo, kaj ankaŭ, ĉar mi sciis, ke la vekilo ankoraŭ ree funkcios — kaj ankoraŭ foje — kaj — Se mi tion estus dirinta al la patro! Ĉu mi postkriu al li? Ne, mi ne kuraĝas!

Mi komencis lavi min — rapide — vestis min senorde, por povi forsavi min. La sonoj en la domo formortis. La aliaj homoj denove enlitiĝis, verŝajne jam ree dormas. Se la vekilo nur volas.....

Subite ĝi ree ektondris sub la litkovriloj. Alia sonorado ol je la unua eksplodo. Fariĝis eĉ pli granda spektaklo, la plej abomenindaj sonoj obtuze sin liberigis el la kovrilamaso. Ho, ĝi estis vere amerika eltrovo!

Ree mi aŭdis sonojn en la aliaj dormĉambroj. Ree la patro envenis en sia ĉambrorobo kaj la domĉapeto surkape.

„Kie ĝi estas?” li alkriis min.

„Sub la litkovriloj,” kaj tiam mi montris la kovril-haŭson. La patro forŝiris la maŝinon de sub la kovriloj kaj dum li tenis ĝin en la manoj, mi vidis lin paliĝi.

„Terurege,” ĝemis mia patro kaj same mi ĝemis.

Nun ankaŭ la patrino, kaj la gefratoj, rapide sin vestintaj, envenis, kaj demandis, kio okazas — kaj inter la terura bruego mi klopodis komprenigi min. La fratinetoj staris kiel palaj fantomoj ĉe la pordokrado kaj la fratoj komencis fuŝi la vekilon — sed la patro ordonis: „Lasu ĝin — alie okazos ankoraŭ pliaj akcidentoj.”

Subite la vekilo silentis kaj agrabla malstreĉiĝo okupis nin. Nun ni povis interkonsiliĝi. Mi klarigis, ke la ilo ankoraŭ minimume kvinfoje ektondros. La patro trovis tion belega perspektivo. Frits proponis, ke ni forportu ĝin en la ĝardenon. Agrable por la najbaroj, opiniis panjo. Sed ni tamen portis ĝin en la ĝardenon, kie

estis ankoraŭ mallumege. „La horloĝo montras duonon post la kvina — mi devas rapidi,” mi kriis kaj rapide reiris al mia ĉambro.

„Malfrue tagiĝas,” la patro ankoraŭ murmuris. Vestante min supre en mia ĉambro, mi vidis la fantoman societon vagi ĉe la lumo de biciklolampo ĉirkaŭ la malantaŭa florbedo kaj singarde formeti tien la amerikan monstron, kvazaŭ ili lokas bombon. Mi malfermis fenestron por aŭdi, kion ili diras, sed ĝuste tiam ili reiris al la domo kaj mi aŭdis la patrinon proponi, ke ili komencu matenmanĝon.

„Jes — bonege — ankaŭ mi venos,” mi kriis.

„Estas bone,” ili ĥore diris.

Post momento ni estis manĝantaj. Al la fratinoj plaĉis, ke ili havos en la libertempo tian longan tagon antaŭ si.

„Ordinare la homoj dormas multe tro longe,” asertis Frits filozofie.

La patro iom grumblis — ŝajne al li ne tiel plaĉis, sed tamen fariĝis gaja matenmanĝo kun malfreŝa pano kaj freŝa haringo kaj bongusta, forta teo.

„Tiaj aventuroj en la fruaj matenhoroj.....” Frits argumentis. Li ne finis. Ekstere ree bruegis la vekilo. Ni fermis la pordon al la ĝardeno, ĉar ni sentis nin kulpaj antaŭ la najbaroj.

„Ni faru, kvazaŭ nin la tumulto ne rilatas,” grimacis Frits. Ekstere ni aŭdis ĵetmalfermi fenestrojn kaj voĉzumadon en la ankoraŭ malluma nokto.

Ni ridis ĝis malsaniĝo, la gepatroj klopodis resti seriozaj. Tiam subite iu sonorigis ĉe nia pordo. La plej proksima najbaro afable, sed insiste petis, ke ni ĉesu tiun noktan spektaklon.

„Noktan,” la patro diris firmvoĉe, „estas tamen preskaŭ duono post la sesa.”

„Duono post la sesa,” diris la najbaro, malagrabra teda viro, „duono post la sesa — tiukaze via horloĝo trofruas kvar kaj duonan horojn!”


„Alportu mian poŝhorloĝon de supre,” ordonis la patro.

Frits kuris supren kaj alportis la oran poŝhorloĝon de mia patro.

„Vi estas prava,” li konsentis, „estas la dua horo. Enportu la vekilon, Frits.”

Frits enportis ĝin. La najbaroj fermis siajn fenestrojn. La matenmanĝon ni ĉesis — je la dua horo nokte deca homo ne matenmanĝas. Kaj ree ni enlitiĝis por dormi, sed tio ne sukcesis antaŭ ol la lasta eksplodo forpasis. Matene mi tro longe dormis — kaj maltrafis la boaton.

## ENIGMOJ.



b, e, e, ĝ, i, i, o, o, o,  
o, m, p, s, s, t, t.

La vortoj signifas, ho-  
rizontale kaj vertikale:

1. prepozicion. 2. plenu-  
mi ordonon. 3. meblon.  
4. kvanton.

Tordingbridge (Angl)

La tuto konsistas el 12  
literoj kaj signifas mali-  
can.



7.8.1.2.6.12 estas bonkora.

3.12.4.5.11.10 estas peno.

9.2.6.10 estas parto de la  
korpo.

M. R. BRYANT.

## LA SOLVOJ EL NO. 6.



Premion gajnis: S.ro Koozoo Janobe, Ucnomija (Jap); F.ino C. de Leeuw, 't Zand (NH) (Ned); S.ino C. v. Bodegom van Holk, Delft (Ned).

Premion pro verkaĵo gajnis:

S.ro V. Mezulis, Riga (Latv); F.ino E. Leffring, Appelscha (Ned).

## ANONCETOJ (30 c. por ĉiu linio).

„Kantas la Hungara Skolto”, kajero kun muziknotoj, hungaraj popol- kaj skolfkantaj tekstoj. Donacu al skoltoj kaj junuloj! Per tio vi interesigos ilin al Esperanto! Preparu la skoltojn por la mondendaro en Nederlando. 2 kajeroj por 0,45 gld., aĉetebla ĉe „La Juna Vivo”. — Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Nagy-Sandor-u-6, Budapest V, Hungarye.

Konatiĝu kun Esperanto-Gazetoj. Por 0,40 gld. (3 resp. kup.) oni ricevas 10 diversajn esp. gazetojn. Adr: Red. „La Juna Vivo”, West-Graafdyk, (NH), Nederlando.

P. Th. JUSTESEN: „Verama raporto pri li german-molsa Milito”. Rakontoj pri „Noodles”, „Schildbürger”, „Molboer”. Esperante por komencantoj. 23 paĝoj. Prezo: 2 resp. kup. — 0,25 gld. Mendebla ĉe „La Juna Vivo”.

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvalora libro de proksimume 200 paĝoj.





### KIOM PROFITA ESTIS DO TIU RESTAJO DA STOFO!

Faru verkaĵon laŭ la supra bildo, kaj sendu ĝin antaŭ 15 Marto al: Red. „La Juna Vivo”, West-Graafdyk, Nederlando. La verkintoj de la plej bonaj verkaĵoj ricevos premion.

Estas tre rekomendinde rakonti laŭ la bildo en grupkunvenoj!

### KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

1. Pro manko de spaco la korespondado, ricevitaj esperantaĵoj kaj aliaj manuskriptoj restis.
2. Esp. grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”n:  
La unuan jarkolekton en: Eindhoven (Ned).  
La duan jarkolekton en: Alkmaar (Ned).  
La trian jarkolekton en: Barneveld, Alphen a/d Ryn (Ned); Bourneville (Angl); Uherski Brod (Ĉeh); Basel (Svis); Olomouc (Ĉeh); Aalborg (Dan).  
„La Internacia Lernolibreto”n: Zaandam, Rotterdam, Schagen, Haarlem (Ned); Klagenfurt (Aŭstr); Tibro (Sved); Senj (Jugosl); Arcais, Somain, Thourars (Franc); Franeker, Heemstede (Ned).
3. Sendu urĝajn mendojn rekte al: Red. „La Juna Vivo”.



Nia plej juna kunlabo-  
rantino Ludmila Jevseje-  
va en Riga (Latvuj),  
kiu verkis suban version.  
Jam aperis kelkaj el ŝiaj  
verkaĵoj en „La Juna  
Vivo”.

### SUR KANAPO.

Al mia koro, plej fidela  
Amiko estas libro bona.  
Dum vintra tago monotona  
Ĝi portas min al land' fabela.  
    Ĝi faras min, en rev', pirato,  
    Kun ruĝa tuko sur la kapo.  
    Mi venkas vastajn oceanojn .....  
    Sidante hejme sur kanapo.

Ĝi portas min al praarbaro  
De Siberio neĝkovrita .....  
Sed jen, eksonas jam gitaro  
En manoj viglaj de Fraskita.  
    Al piramid', al sfinkso muta,  
    Al sekaj palmoj en oazo,  
    Al montdeklivo akre kruta  
    Ĝi min kondukas ĉe okazo.

Ho, kion ja travivas koro,  
Pri kio revas mia kapo.  
Se kun la libro sur genuoj,  
Mi sidas sola sur kanapo!

## Por Komencantoj.

### LA TREZORO.

Karlo estis iom stulta. Li fosis sian ĝardenon. Subite li trovis malgrandan moneron. Li tre ĝojis pro la trovaĵo kaj daŭrigis sian laboron. Post unu minuto alia monero brilis inter la terbuloj.

„Kia feliĉo”, li kriis, enpoŝigis la monon kaj denove eklaboris. Ree kaj ree li trovis moneron. „Tiu ĝardeno estas vera trezorejo,” li diris al si mem. Li pli kaj pli fervore laboris, kaj eĉ plilongigis la labortempon. Li tre ĝojis, ke li trovas tiom grandan rekompencon por sia laboro. Fine tamen li ĉesis, ĉar lia dorso jam doloris. Krom tio li jam dum la lasta tempo ne plu trovis ion.

„Mi certe jam posedas multan monon,” li diris kaj ridaĉis. Li metis sian manon en la poŝon por nombri la trezoron. Ho ve! Li ne trovis tutan manon da moneroj, sed..... grandan truon en la poŝo. Kaj nun li divenis ĉion: Li perdis sian propran moneron, kiun li portis en la poŝo. Li ree kaj ree trovis ĝin, enpoŝigis ĝin, perdis ĝin..... ĝis kiam li fine ne plu ĝin trovis. Li ne nur ne posedis trezoron, sed eĉ lia propra sola monero estis perdita (perdiĝis).

Schattendorf (Aŭstr).

J. WIESBÖCK.

### LA SUSPEKTEMA HOMO (antikva ĉina fabelo).

Homo perdis sian hakilon, kaj li suspektis pri tio la filon de sia najbaro. Li kaŝe atentis la knabon, kaj en ĉiuj liaj agoj li legis la ŝtelon: en lia mieno, en lia parolo, en lia konduto, en ĉio. Nenio montris, ke la knabo ne ŝtelis la hakilon.

Tamen post kelkaj tagoj la homo eniris sian kelon, kaj trovis tie — la hakilon. Poste li revidis la knabon, kaj trovis, ke nenio en liaj agoj montras, ke li ŝtelis la hakilon.

El „LA MONDO” (ĉina esp. gazeto).

#### Tasko:

- I. Traduku en vian gepatran lingvon: „La trezoro” kaj „La suspektema homo”, kaj rakontu la enhavon per propraj vortoj.
- II. Lerne parkere „Sur Kanapo”, kaj deklamu ĝin dum la grupkunveno.
- III. Lerne parkere kaj traduku jenajn proverbojn: Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme. — Koro pleniĝas, lango moviĝas. — Ne ĉio utilas, kio brilas. — Inter faro kaj rakonto staras meze granda monto.

## LA DUDEK TRIA LECIONO.

A. Re-veni al la domo = denove veni al la domo; re-legi = denove legi; re-vidi = denove vidi; redoni, reiri, reaŭdi, resalti, reĵeti, retrovi, **reformi**, **rekon**i, rekomenci.

## B. La malsana infaneto. (Courteline).

*Kuracisto: (kun ĉapelo en mano):* Ĉu ĉi tie estas malsana infaneto?

*Sinjinoro:* Jes, sinjoro doktoro. Eniru do. Estas por mia knabeto. Imagu, tiu kompatinda karulo, mi ne scias, kiel okazis, sed de hodiaŭmatene ĉiam li falas.

*Kur:* Li falas!

*S.ino:* Ĉiam, jes s.ro doktoro.

*Kur:* Strange, kiom aĝa li estas?

*S.ino:* Kvarjara.

*Kur:* Sed en tiu aĝo ĉiu staras sur siaj kruroj! Kaj kiel tio okazis al li?

*S.ino:* Mi neniom komprenas pri tio, mi diris al vi. Hieraŭvespere li tre bone fartis, kaj li paŝetadis kiel kuniklo tra la loĝejo. Hodiaŭmatene mi iras por preni lin el la lito, kiel mi faras kutime. Mi surmetas al li la ŝtrumpojn, lian pantalonon, kaj metas lin sur la krurojn. Puf, li falas.

*Kur:* Maltrafan paŝon eble?

*S.ino:* Atendu!..... Mi restarigas lin, puf, li duafoje falas. Mire mi ankoraŭfoje restarigas lin. Puf, teren! Kaj tiel sep aŭ ok fojojn!

*Kur:* Jen estas kvazaŭ miraklo. Ĉu mi povus vidi la malsanuleton?

*S.ino:* Jes. (*Ŝi eliras, kaj reaperas kun knabeto sur la brakoj*).

*Kur:* Li estas belega, tiu infano! Metu lin sur la plankon, mi petas.

(*La patrino obeas, la infano falas*).

*Kur:* Ankoraŭfoje, mi petas. (*La infano denove falas*).

*Kur:* (reveme) Stranga afero. (*Al la malsanuleto, kiun la patrino tenas en la brakoj*). Diru al mi, amiketo, ĉu vi ie havas doloron?

*Inf.:* Ne, sinjoro.

*Kur:* Ĉu vi bone dormis?

*Inf.:* Jes, sinjoro.

*Kur:* Ĉu vi havas apetiton? Ĉu vi ŝatus supon?

*Inf.:* Jes, sinjoro.

*Kur:* Sendube! (Kompetente). Estas paralizo.

*S.ino:* Para..... Ho Dio (*ŝi levas la brakojn al la ĉielo*) (*la infano falas*).

*Kur:* Efektive, sinjinoro. Kompleta paralizo de la malsupraj membroj. Cetere vi ĵus mem vidis, ke la kruroj de la knabeto estas absolute sensentaj. (*Parolante li alproksimiĝas al la infano kaj li intencas fari eksperimentojn, sed subite.....*)

*Kur:* Ha, tio, ha..... tio, sed ha..... sed (*kriegante*) Ho, sinjinoro, kial vi ĝenas min per tia paralizo!??

*S.ino:* Sed..... s.ro doktoro.....

*Kur:* Nun mi komprenas, kial li ne povas stari sur siaj piedoj..... Vi metis ambaŭ liajn krurojn en la saman parton de lia pantalono.

Soissons (Franc)

El la franca trad. J. BOURNICHE.

C.	kuraci	ĝeni	paralizo	kompetente	supre	Dio
	farti	intenci	eksperimento	efektive	ĵus	ie
	revi	miraklo	supo	kutime	neniom	
	obei	ĉielo	absolute	cetere	kvazaŭ	

D.	S.ro	= sinjoro	k.t.p.	= kaj tiel plu
	S.ino	= sinjorino	k.a.	= kaj aliaj
	f.ino	= fraŭlino	k.s.	= kaj similaj
	k.do	= kamarado	i.a.	= inter aliaj
	k.ino	= kamaradino	ekz.	= ekzemple
	d.ro	= doktoro	t.e.	= tio estas

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn; b. Laŭtleĝu kelkfoje „La malsana infaneto”; c. Kopiu kaj traduku A kaj B en vian kajeron.

**Traduku:** Kapnei, kapjesi, irmaniero, amoplena, mortbati, vangobati, **voĉ-doni**, bonfari, petskribo, piedfingro, piediri, alt-**ranga**, salutparolo, partopreni, fruktodona, **movopl**ena, partopagi, enirpago, jarcento, poŝhorloĝo, bonkvalita, punlaboro, enlanda, eksterlanda, kunveni, enskribi, ĉeesti, antaŭnomo, deveno, (Ripetu la ludon paĝ. 69).

## LA DUDEK KVARA LECIONO.

### Optimismo.

Iun tagon du **ranoj** falis en sitelon da lakto.

„Estas la fino”, **veis** unu el la ranoj, kiu estis pesimisto. „Ekzistas eĉ ne la plej malgranda **ŝanco** elveni el la sitelo. **Kiom** alta estas la **vando** kaj **kiom glata!** Kial daŭrigi la penadon. Estus vane. Mi **akceptas** mian **sorton**.....” Li **etendis** la krurojn kaj **dronis**.

La alia rano estis optimisto. „**Terura** historio”, li pensis. „Sed mi ne perdu la kuraĝon. Mi **baraktos kiom eble plej longe!**”

La tutan nokton li laboregis per la kruroj. Kaj kiam fine la unuaj **sun-radioj penetris** en la sitelon, la senlaca rano sentis ion **firman** sub la piedoj:

Ĝi sidis sur **buleto** da butero!

a. Kopiu, traduku kaj lernu la novajn vortojn; b. Lernu parkere „Optimismo”; c. Respondu al jenaj demandoj.

Respondu al jenaj demandoj:

Kio okazis iun tagon? Kial **veis** la unua rano? Kia **ĝi** estis? Ĉu **ĝi** provis iri el la sitelo? Kial **ĝi** ne sukcesis? Ĉu **ĝi** longe penadis? Kial **ĝi** **dronis**? Kia estis la dua rano? Ĉu ankaŭ **ĝi** **dronis**? Kion **ĝi** pensis? Kiel **ĝi** savis sin? Kio fine estis en la sitelo?

## KORESPONDADRESOJ.

- Anglujo:** 18 lernantinoj (16-18) dez. kor. kun gejunuloj ne pli maljunaj en ĉiuj landoj. Ne interŝ. poŝtm., kaj ne partoprenos ĉenleterojn. Adr: F.ino V. C. Nixon, 183 Woodlands Park Rd., Bourneville, Birmingham.
- Ĉeĥoslovakujo:** S.ro Václav Mitacěk, lignaĵisto (momente militservisto) deziras korespondi. Resp. certa. Adr: Hluk, c 819.
- Ĉeĥoslovakujo:** 17 jara komizo, Zdenko Vyzamal, Otrokovice, Masarykovo 116, deziras korespondi kaj interŝ. poŝtm. kun gesamideanoj.
- Ĉeĥoslovakujo:** S.ro Frant. Blaha, fakinstruisto, Uhersky Brod, sendas 50 bonajn poŝtm. (kompl. serioj) por samvalora kvanto. Certe respondos.
- Ĉeĥoslovakujo:** Gekursanoj serĉas korespondantojn el ĉiuj landoj. Skribu al: Fr. Blaha, faka instruisto, Uhersky Brod.
- Danujo:** S.ro Emil Hansen, Nyportstr. 43, Køge, dez. kor. kun jodla-kantist-(in)oj.
- Hungarujo:** Ni serĉas skolt-korespondantojn precipe el malproksimaj landoj. Hungara Skolta Esp. Rondo, Nagy Sándor u. 6, Budapest, V.
- Hungarujo:** S.ro Tamás Nagy, Esztergom, Szt. Antal kollegium, V.o.rg., dez. kor. precipe kun malproksimaj landoj.
- Hungarujo:** S. Osenky, 16 jara gimnaziano, deziras kor. kun hinda indiĝeno, malaja junulo aŭ japana. Reform. Iskola, Rüsspökladány.
- Italujo:** S.ro Giovanni Casini, Via S. Maria 91, Pisa, dez. interŝ. esperantajojn kun ĉiulandaj gesamideanoj.
- Jugoslavio:** S.ro Albert Josip, Subotica, Bajski vinogradi 218, dez. kor. pri ĉiuj temoj.
- Latvujo:** S.ro Baĉanski dez. kor. kun eksterl. finoj. Adr: Koku iela 2-2, Riga.
- Latvujo:** F.ino M. Jakobson dez. kor. kun eksterlandaj samideanoj kaj interŝ. il. poŝtk. Riga, Marijas iela 83/85, dz. 39.
- Nederlando:** Kiuĵ desegnas por mi „Ex Librus” on, tiuj ricevos por si ekzempleron de mi desegnita. F.ino Jekke van Dijk, Fröbel-instruistino, desegnantino (meztalenta!), Rauwerd (Fr).
- Nederlando:** S.ro Corn. Krab, 21 jara, Duinstr. 31, Egmond aan zee, dez. kor. kun fraŭlinoj el ĉiuj landoj. Certe respondos.
- Nederlando:** S.ro M. W. L. Pentermann, 28 jara legomkulturisto, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Kol. poŝtm. Resp. certa. Harkstede.
- Nederlando:** Manĵo Polderman, 9 jara, Wagenaarstr. 30, Middelburg, dez. kor. per il. poŝtk.
- Nederlando:** S.ro H. L. Hartog, leteristo, Kathammerstr. 68, Volendam, dez. kor. kun ĉiuj landoj.
- Nederlando:** Esp. Grupo organizas en Marto letervesperon kaj dez. kor. Bonvolu sendi let. kaj poŝtk. il. multope al: F.ino L. Kip, Laurierstr. 18, Schagen (N.H.).
- Nederlando:** F.ino M. Broerse, Genieweg 1156, Assendelft (NH), dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Respondo certa.
- Svedujo:** S.ro K. E. Johannesson, Solgårdén, Lund, deziras interŝ. poŝtmarkojn de la tuta mondo. Certe respondas.
- Francujo:** S.ro P. Charlet, 16 Rue de la Mairie, Marpent, Nord, 22 jara, dez. kor., hispane aŭ angle k. iom esp. Resp. certa.

**Ĉeĥoslovakujo:** Václav Sirdek, 13 jara studento dez. kor. kun juna Esperantisto kaj interŝanĝi poŝtm. Těsetice, ĉe Olomouc.

**Ĉeĥoslovakujo:** 17 jara studentino dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Libuse Mencová, Těsetice ĉe Olomouc.

**Ĉeĥoslovakujo:** 17 jara studentino dez. kor. kun gesamideanoj el ĉiuj landoj. Jarmila Šimsálková, Těsetice ĉe Olomouc.

**Japanujo:** 25 jara apotekisto dez. kor. kun gesamideanoj. M. Morisima, Kaŭasakiĉo, Ujijamadasi, Mieken.

**Nederlando:** 24 jara fraŭlo dez. kor. precipe kun finoj per let., il. poŝtk., interŝ. poŝtm. kaj il. gaz. S.ro C. Schipper, Hem H 96.

**Nederlando:** 15 jara knabo dez. kor. kun eksterlandaj knaboj. Certe respondos. Adr: P. de Jong, Middelie 161 (NH).

**Nederlando:** 15 jara knabo dez. kor. kun eksterlandaj knaboj. Certe respondos. Adr: M. Tromp, Kwadyk (NH).

**Portugalujo:** „Norda Stelo”, Sanatorio M. da Gelfa, Minho, sendas 50 uzitajn poŝtmarkojn al kiu sendos al ĝi la samon. Certe respondos.

**Danujo:** S.ro Rik. Kristensen dez. kor. Norgesgade 8<sup>1</sup>, Aalborg.

**Danujo:** Grupo da Esperantistoj dez. kor. Skribu multnombre al jena adreso: Rikardo Kristensen, Norgesgade 8<sup>1</sup>, Aalborg.

**Nederlando:** 11 junaj geesperantistoj (10-14 j) dez. kolektivitan korespondadon kun ĉiuj landoj. Skribu al: S.ro Bart C. Elskamp, lernejestro, Hinde-loopen.

**Franĉujo:** 23 jara fraŭlo dez. kor. per il. poŝtk. k.ĉ.l. Afranku plej div. filatele. S.ro J. Bricaut, 11bis Rue Aristide Briand, Caudry (Nord).

### LA VOJAĜO AL SVISUJO.

(Vidu la januaran numeron de „La Juna Vivo”).

La redakcio povas esti kontenta pri la ĝenerala aprobo, kiun la vojaĝplano trovis. Dum la plej frostaj tagoj en Januaro anoncis sin jam 20 personoj por la somervojaĝo. Kelkaj nur provizore anoncis sin, ĉar ili ne estas certaj pri sia libertempo.

Kelkaj petis pli detalajn informojn, kiujn mi volonte havigas. Jen la respondoj al diversaj demandoj:

1. Por tendo de  $2 \times 2$  metroj mi repagos 4 guldenojn, por tendo de  $3 \times 2$  metroj 8 guldenojn. Mi nur povas akcepti tendojn, kiuj absolute ne tralasas akvon kaj havas bonan tertolon.
2. Mi kunprenos maldikajn matracojn, sur kiuj oni prince povas dormi. La plej granda malfacilaĵo verŝajne estos, ke la dormantoj ne deziras forlasi la liton!
3. La garantiosumo estas dek guldenoj. Kiu anoncas sin, sendu samtempe tiun sumon, por ke li estu certa pri sia loko en la aŭtobuso. Kiel jam dirite, kiu retiros sin antaŭ la 1a de Majo ricevos la pagitan sumon.
4. Se forte pluvos vespere ni trovos tranoktejon ĉe bienposedanto aŭ en iu granda salono. La organizanto havas sufiĉe da sperto pri tiaj aferoj.
5. Eksterlandanoj povas sendi la monon ĉu parte, ĉu tute per poŝtmandato al mia persona adreso, nome: C. J. v. Veenendaal, Lernejestro, West-Graffdyk, Nederlando.
6. Povas partopreni esperantistoj de dek kvin ĝis sepdek jaroj.

**REKLAMTARIFO:**

1 paĝo: 15 gld.; ½ paĝo: 8 gld.; ¼ paĝo: 4,5 gld.; ⅛ paĝo: 2,5 gld.

**LITERATURA MONDO,**

nia sola literatura gazeto. Kunlaboras ĉiuj gravaj esperantistoj verkistoj.

ABONO POR JARO 4,50 GLD.,

ĉe „LA JUNA VIVO”, West-Graafdiijk.  
Specimeno kostas 0,15 gld.

**NEDERLANDA ESPERANTO  
KONGRESO**

**dum Pasko (27-28-29 Marto)  
en den Helder**

Petu aliĝilojn aŭ plurajn informojn al la sekretario de la L.K.K.

S.ro P. DE JONG, BEUKENKAMP-  
STRAAT 4, DEN HELDER.

Ĉiu esperantisto estos bonvena, kian ajn religion aŭ politikan konvinkon li havas.

La plej detalajn kaj objektivajn libro-kritikojn vi trovas en

**„LINGVO LIBRO”,**

kvaronjara aldono al „Literatura Mondo.” Aparte aĉetebla.

Jarabono 0,80 gld., ĉe „LA JUNA VIVO”. Specimeno kostas 0,15 gld.

La Esperantistoj revis havi gazeton redaktatan de profesiaj ĵurnalistoj. Ilia revo efektiviĝis!

**Aperis:**

**NIA GAZETO**

Ĉefredaktoro: S. Grenkamp-Kornfeld.

Abonprezo: fr. fr. 15 = 1,35 guld.

Petu senpagan specimemon ĉe „La Juna Vivo”, West-Graafdyk.

**SKRIBA KURSO**

por A. kaj B.

(nur por holandlingvanoj).

Trè detala B-kurso. Gvidanto

**Simon Aarse.**

Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis.

**La Verda Stelo, Radioweg 45,  
Amsterdam-O.**

**JEN LA SOLVO!**

Vi ne kuraĝas starigi esp. kursojn, ĉar vi ne estas sperta instruisto? Ne timu, per la simpla metodo en la „Internacia Lernolibreto”

„LA JUNA VIVO”

vi povas instrui!

La tre malalta prezo kaj la varia enhavo certe allogos multajn kursanojn! Petu specimemon!!! (0,20 gld. aŭ 2 resp. kup.).

**NE FORGESU**

ke la binditaj jarkolektoj

de

**„LA JUNA VIVO”**

estas la plej valoraj kaj malkaraj lernolibroj por Esperantokursoj en ĉiuj landoj

Prezo: 1,6 Sv. fr. = 0,75 gld.

Grupoj kaj abonantoj ricevas rabaton.

**L. M. LIBRO**

Lo Mo-libro — mia nomo.

Min aŭskultu ĉiu homo:

Sekvos tie ĉi monate.

Novaj versoj, akurate.

Vi ja ne klopodos vane!

Se vi ĉiujn skribos mane,

Ni vin por la granda laco

Rekompencos per donaco.

Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe le redakcio de „La Juna Vivo”! (Petu senpagan L. M. libro-liston!).